



# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 4

Aprilo, 2018

*Karaj Legantoj, saluton! Multaj scias, ke en Ŝikago preskaŭ forestas printempo: ankaŭ ĉi jaro provas tion: malvarma Pasko, ofte frostas, laŭ prognozoj – ne tro varma la unua duono de Majo kaj poste... – pluva Junio kun varmega Julio ktp. Do, kiel promesite, ni daŭre aperigas impresojn pri la lasta TAKE sur Kuba insulo: direktoro H. Becklin prenis stafeton de la vic-prezidanto Randio. Ĝuu vojaĝ-taglibron de s-no Hanso! Li estas nia fervora kontribua(o)nto: pri UK en Lisbono, novembra Ĉinio...*

*La redakcio*

## **Al insulo ne fora, sed malsammora de Hanso BECKLIN, direktoro de la ESdŜ**

Meditante pri la dika tavolo da neĝo, kiu lastatempe invadis mian angulon en la nordo de Usono, mi rememoras la varmecon de lando, kiun mi lastatempe vizitis. Ne, ne temas pri senlimaj glaciigitaj kokteloj dum tempo en naĝbaseno apud Meksika strando, ĉe kiu sunradioj povus ĝermigi glaciigitan Usonanon. Tiaj spertoj

povas esti bonaj por troŝarĝitaj nordanoj, kiuj volas iom vegeti por senti sin denove homa. Tamen, oni povas senti sin pli homa per stimulado, per defioj al si ene de draste malsama kulturo. Ĝuste tiun varmecon mi sentas, pripensante mian lastatempnan vojaĝon: la varmegon de forno, kiu povas transformi paston en panon aŭ bulon el argilo en fajencan kruĉon.

Antaŭ krepusko mi vekiĝis en Milvokio; mi kondamnis tiun, kiu mendis la flugbiletojn, aŭdante la vekhorloĝon sonorantan. Tamen, estis mi mem, kiu mendis kaj sole min mem mi riproĉis per tiuj sakraĵoj. Ankaŭ mia edzino, ne akompananta min, ĝemis je la penetra sono; ŝi rapide surmetis sian mantelon, koltukon, botojn kaj gantojn por fronti la veteron milvokian, kiu komplete grimpis dum la semajno de minus tridek gradoj celsiaj ĝis minus dek du en tiu sabato. Mi vestis min per ĝinzo kaj leĝera pulovero celante la sunradiojn sudajn, spite al



mezusona malvarmo.

La aviadilo eliris ĝustatempe je la kvina kaj duono; post dormeto en la jeto mi povis matenmanĝi en Atlanto antaŭ ol denove enaviadiliĝi. Trovinte mian amikon Brajeno, kiun mi konvinkis kuniri kun mi al la kongreso, mi manĝis kirlitajn ovojn kaj kolbason. Tason post taso da kafo mi trinkis kiel

kutime; Brajeno trinkis sensukeran kolaon en ĝia hejmurbo.

Manĝante, ni preparolis la frenezan planon, kiun ni elpensis en la pasintaj tri semajnoj. “La kongreso certe estos bunta kaj la homoj afablaj... sed ĉu vi kunportis necesejan paperon, kiel mi konsilis?” – demandis Brajeno, kiu en 2015 vizitis Kubon kiel unu el la unuaj Usonaj Esperantistoj, kiuj laŭleĝe partoprenis kongreson tie. Li estis samtempe ravita kaj stuporigita de tiu nacia kongreso, kiun li partoprenis, kaj li rakontis al siaj amikoj: “Ĝenerale la sperto estis tre bona, sed kruda estis la stato de la gastejoj kaj kongresejo: oni eĉ ne povis gargarigi la necesejan pelvon.”

Tamen, estante juna, ĉi tiaj rakontoj ne timigis min; post la falego de la prezoj de flugbiletoj al Kubo tri semajnojn antaŭ la kongresa komenciĝo, mi decidis forlasi singardemon kaj organizi ĉion por mi mem haste. Mi hazarde kontrolis la prezojn ankaŭ el

la urbo de Brajeno, simple por aŭ fanfaroni pri mia fortuno aŭ tenti lin al partopreno; ankaŭ al li la suno eklumis. Sed ne ĉion solvis aĉetado de flugbileto kaj aliĝo al la kongreso.

Ne ĉiu papereto estas bankbileto; tamen, ĉe tablo tiun matenon en Atlanto mi enmanigis koverton al Brajeno plenan je kelkcent eŭroj, kiujn mi aĉetis por li kontraŭ kompenso en dolaroj. Usono blokas ĝirojn inter Kubo kaj Usono; tial estas plej saĝe kunporti eŭrojn anstataŭ dolarojn, kontraŭ kiuj oni devas pagi multe pli altan kurtaĝon por aĉeti kubajn pesojn. Ho jes, oni rajtas pagi en Kubo per sia kreditkarto aŭ depreni deponaĵojn el sia konto per debetkarto – se vi ne estas usonano.

Post la manĝo ni piediris al la pordego de nia aviadilo; jam tri horojn antaŭ ol ekiri vico da homoj staris por plenumi formularojn. La unuan fojon dum 25 jaroj da vojaĝado mi devis plenumi formularon antaŭ ol eliri el Usono; mi devis priskribi, kial mi rajtas iri al Kubo kaj konsenti ne uzi servojn posedatajn de la militistaro, kiuj efektive konsistigas la plejmulton de la turismaj hoteloj kaj restoracioj. Kvankam la demandoj estis imponaj kaj timigaj, ĉiuj diris, ke ili estas nur pozitaj malgraŭ la oficialaj sigeloj kaj grandaj monpunoj. Nur burokratoj vaŝingtonaj ŝajnigas ŝtatajn minacojn al siaj civitanoj per tiom da formularoj anstataŭ per doganisto!

Ni atendis, babilante en Esperanto. Kiam alruliĝis al la pordego la aviadilo, mi iomete ŝokiĝis pro ĝia malgrando. La aviadilo inter Milvokio kaj Atlanto entenis duoble pli grandan kvanton da homoj, kaj mi konjektis, ke tiu al Havano estos almenaŭ tiel granda. Mi malpravis, sed la alumina tubo flugonta estis plena ĝis sia limo. Bonŝance la flugo daŭris nur du horojn kaj la apudulo ne dormis sur mia ŝultro.

Surteriĝante en Havano mi vidis safiran maron kaj kremkolorajn strandojn. Preter la bela strio etendiĝis ruĝargilaj kampoj kronitaj per palmoj kaj foliantaj plantoj. Ekster la klimatizita kaj moderna veturilo kaj en la forno de Havano, mi la duan fojon en la tago kulpigis min pro nekonvena vestaĵo. Mi senpuloveriĝis antaŭ ol eliri la aviadilon, sed eĉ ĉemizo kaj ĝinzo estis tro ŝvitiga.

Bonvenon al Havano kaj al ĝia tute normala flughaveno. Oni devis sin legitimi per pasporto, flugbileto kaj vojaĝkarto (kvazaŭvizo aĉetita kontraŭ 50 usonaj dolaroj). Sed tio postulis nur kelkajn momentojn, same kiel postulas eniri ajnan landon. La malsameco montriĝis poste, kiam blanke vestitaj homoj okulumis la alvenantojn por kontroli, ĉu ili estos ŝarĝa al la sansistemo Kuba. Al mi la flegistino simple mangestis preter sin. Plu montriĝis, ke ni ne estis en Usono malgraŭ la mallonga vojaĝo: kvankam mi ne kunportis ion ajn krom granda tornistro, ni atendis ĉe la valizbendo dum pli ol unu horo la valizon de Brajeno.

Kun valizo enmane, ni eniris la halon. Humida aero trafis nin kaj ni vidis blankan tabulon: “Esperanto-Kubo”. Ni alproksimiĝis al la juna virino kaj ŝi respondis en klara Esperanto. Kvankam ni jam atendis multe, ni devis atendi plu la alvenon de iu alia. Akvon ni trinkis, monon ni ŝanĝis, aŭton ni atendis. Finfine ĝi alvenis, kaj ĝi estis de alia marko ol mi iam ajn vidis. Ne ĉar ĝi estis antaŭrevolucia Usona marko, kiu bankrotis jardekojn antaŭ ol mi naskiĝis. Ĝi estis tute nova kaj absolute senmakula, sed – ĉina...

(daŭrigota)

## Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Randy Ream  
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707  
773-262-7738  
www.esperanto-chicago.org

## Estraro:

Prezidanto – Eric Killian  
Vicprezidanto – Randy Ream  
Ekspredizanto – D-ro Les Kordylewski  
Sekretario – Tina Seastrom  
Kasisto – Charles Gunn  
Direktoroj – Viktor Payuk, Hans Becklin

## MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare  
Familia membro: \$30  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago and mailed to our Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

## SEKVANTAJ KUNSIDOJ

Venonta kunsido okazos en la Centra Biblioteko laŭ la adreso: **400 S. State St., Ŝikago, IL 60610**. 6-a (sesa) etaĝo suda (aŭ norda) stud-ĉambro.

**22-an de Majo** – Porinfana literaturo  
**24-an de Junio** – tradicia E-pikniko

## Komuna Usona kaj Kanada E-kongreso

La ĉi-jara Landa Kongreso de Esperanto-USA kaj la Kanada Esperanto-Asocio okazos ĉe la Universitato Seattle Pacific en Seatlo, Vaŝingtonio de la 13-a de Julio, vendredvespere, ĝis la 16-a, lundtagmeze. Estas planataj ekscita kongreso plenplena de muziko, ekskursoj, aktivajoj, interesaj prelegoj kaj specialaj eksterlandaj gastoj. Krome, ni planas tendumadon en proksima parko (16-22-a de Julio). Eblas interreta registrado: [lk2018@esperanto-usa.org](mailto:lk2018@esperanto-usa.org).